

LAMENTAS PRI LA MORTO DE S-RO MATUKURA RANRAN

Kun armiloj eĉ dum dormo strebi, ne ŝanceliĝante – tio estas la deziro de samurajo. Sen devio inter sento kaj intelekto – tio estas la merito-atributo de la virtulo. Ĉe la bedaŭrata s-ro Matukura Ranran la ostoj penetritaj de justeco, la intestaro – de honesteco, la spirito – de Laozi kaj Zhuanzi, aldone en la pneŭmono kaj en la hepato ludis estetiko de hajko. Jam trapasis 19 jaroj post nia renkontiĝo. Antaŭ tri jaroj li forlasis oficon. Spite, ke li dezirus sekvi saĝulojn-ermitojn en kaverno, li devis vivi ankoraŭ en la mondo, zorgante pri siaj maljuna patrino kaj infaneto. Tamen li malligiĝis de iu ajn reputacio bona aŭ malbona, tiel li ĉiam sidis kun vento kaj nubo, do ĉi-jare dum tri tagoj meze de la oka monato li volis vidi lunon, aŭdante ondon ĉe la bordo de Yui kaj Kanazawa, kaj vizitis Kamakura, apogante je bastono. Sur la revena vojo li eksentis sin malbone kaj fine li mortis. Tio okazis en la 27-a nokto de tiu sama monato. Li mortis pli frue ol sia sepdek jaraĝa patrino, postlasinte je sia domaĝo sep-jaraĝan infanon. Li, bedaŭrinde, ankoraŭ ne atingis kvindek jarojn. Li estis grandulo, kiu ne domaĝus de vivo per harakiro por publika justeco, tamen li velkis kiel herbo sub blovado de aŭtuna vento. Kiel li ege plorus pro bedaŭro! Al mi estas triste, ke mi prezentas al mi lian koron antaŭ morto. Kiel domaĝe estus al lia patrino, kiel malĝoje al lia familio! Liaj proksimuloj, informigite, ja adiaŭis lin, kvazaŭ liaj parencoj. En pasinta unua monato li alvenis kun sia infaneto al mia ermitejo, kaj li petis min, ke mi donu al la infano kromnomon. Al mi ekaperis la epizodo, ke unu el sep saĝuloj en bambua arbaro, Wang Rong [japane – Ou Zyuul], havis brilajn okulojn. Do mi nomis la infanon Ranzyuul, preninte unu ideogramon “Rong” per japana pronoco. Kvazaŭ antaŭ miaj okuloj mi rememoras, kiel la mortinto ekĝojis.

Je mortintoj sopiras eĉ ne proksimuloj, des pli por intimaj amikoj, interrilatintaj longe kvazaŭ patro kaj filo, kvazaŭ manoj kaj piedoj, estas tiel tristege, ke en maro de larmoj trempiĝus mia maniko kaj flosus mia kapkuseno. Se, prenante tuĉpenikon, mi volas skribi mian senton, mi ne povas esprimi pro mallerteco. Se mi volas diri ion, mi deprimiĝas. Nur, apogante min sur tableto, mi turnas min al la ĉielo.

Triste,

Pro aŭtuna vento

Rompiĝis la morusa bastono.

[Akikaze ni orete kanasiki kuwa no tuel]

Basyoo

La trian de naŭa monato mi adovizitis la tombon.

Ĉu vi vidas el tombo?

En la sepa tago post via morto

Krescenton, la trian lunon.

[Misiya sono nanoka wa haka no mika no tuki]